

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Daŭriga Kurso / Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo

*Hama-Ronda Vespero

jul. 16 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 710
Temo: Ekstersonoren : propra aspekto pri muziko, lingvo, teknologio...

Preleganto: s-ro SAEKI Hiroyuki (komponisto)

S-ro Saeki komponis en 2006, la verkon
“ ... sed blinda celo”, influite de “ Infana Raso”
de William Auld.

*Sesio pri Someraj Spertoj

sept. 3 (sab) 16h00-18h00, ĉambro 711
Oni libere prezentos sian sperton dum la somero.

*Legado-Kunveno

sept. 10 (sab) 13h00-15h00, en la 9a etaĝo
Leginte la krimromanon “ Falĉita kiel fojno”
de Sten Johansson, oni parolos ties impreson.

TIEL OKAZIS EN LA HAMA-RONDA VESPERO

*Hama-Ronda Vespero jun. 18 (sab)
17h00-19h00, ĉambro 710

Temo: Vasiliĵ Eroŝenko (en la japana)

Preleganto: s-ino ISAKI Miĉiko

Eroŝenko (1890-1952) estas konata inter japanaj literaturistoj kiel poeto kaj infan-literaturisto rusa. Pri la vivo de juna Eroŝenko en Japanio, prelegis s-ino Isaki. Li venis lerni en Blindula Lernejo de Tokio en 1914, estante 24-jara. Pri tio restas petletero japanlingva de la rusa ambasadoro en Japanio al la Lernejo. Tiaj kaj aliaj dokumentoj estis elfositaj de la preleganto, kiu poste laboris en la sama lernejo por blindaj geknaboj, kaj nun volontule servas por dokumenti el la arkivo de la Universitato Tukuba, sub kiu rangas la lernejo. El siaj

spertoj, la preleganto trovas “ lum-sensan kapablon” ĉe iuj blinduloj, kaj supozas, ke Eroŝenko havis tian sens-kapablon, laŭ legado de liaj verkoj. (Raportis SZ)



■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS EN LA “INTERKLASA LERNADO”

Nun en sabato okazas 5 klasoj paralele en ĉambroj en la sama konstruaĵo, uzebla de la civitanaj grupoj. Ne estas multaj ŝancoj por la rondanoj koni unu la alian, kaj lerni kune. Por tio estas planita 30-minuta tempo nomata “interklasa lernado”. Principe ĝi okazas de la 15a kaj duono ĝis la 16a en la plej vaste abonita lernoĉambro en la 3a sabato de ĉiu monato. En tio, gvidanto de ĉiu klaso alterne prezentas ion. Sed lastatempe foje ĝi ne okazas en iu monato, aŭ foje okazas en la 4a sabato; ĉar estas multaj civitanaj grupoj dezirantaj uzi la ĉambrojn, kaj estas malfacile aboni vastan ĉambron. Ĝis nun en tiu ĉi jaro 2011 okazis jene.

★ januaro 29: Prezentis s-ro IWAYA Mituru, gvidanto de merkreda interparola klaso en 2010 (jam ne okazanta), manieron buŝe ekzerci Esperanton. Li uzis specialan komputilan programon, nomatan “Hayaemon”. Ĝi kapablas distranĉi parton de longe registrita sondokumento. Per ĝi, oni povas aŭskulti kaj ripete diri esperantajn frazojn.

★ februaro 19: Gvidis la sesion s-ro DOI Hirokazu, gvidanto de la Meza Klaso 3. En lia klaso, oni legadis la libron “Vivo de Zamenhof”, verkita de Edmond Privat, kaj post kelkaj semajnoj, oni finlegos ĝin. Tial la klasanoj prezentis sian impreson pri la libro, kaj pri la vivo de Zamenhof.

★ marto: ne okazis post la tumulto de la tertremo.

★ aprilo: ne okazis, ĉar mankis taŭga ĉambro.

★ majo 28: Parolis s-ino DOI Ĉieko, gvidanto de la Meza Klaso 2. Ŝi prezentis sub la temo “Atendintaj Vortoj”. Iuj esperantaj vortoj, aŭ vorto-paroj estas malfacile uzeblaj. Ekzemple la rilato inter ĉesi/ĉesigi kaj daŭri/daŭrigi estas ne simetria.

★ junio 18: S-ino HIROSE Kanae, gvidanto de la Meza Klaso 1. Ŝi prezentis la Cse[Ĉe]-metodon, senperan instruadon de Esperanto, kaj donis modelan lecioneton.



LEGOKUNVENO

En la 11a de junio okazis legokunveno, kun 4 venintoj kaj 1 papera kontribuo. El ili, ni prezentas 2 eseojn verkitajn en Esperanto.

Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi

Mizro Iwaya

Tiu ĉi ĉarma libro estas historia romano en la epoko de laŭvorte floranta Florenco. Tie elstaris du grandaj familioj, kiuj kontraŭstaris unu al la alia: Mediĉo kaj Padzo. Rezulte estiĝis pluraj konfliktoj en la urbo. Krom tio, la heroo (lernanto Paolo) agadis ĉirkaŭ la fama artisto Leonardo da Vinĉi. Li estis fama kaj aktiva artisto. En tiu cirkonstanco abundas spektakloj kaj aventuroj en la romano.

La fakto, ke la scenejo estas Florenco, vekas en mi specialan emocion, ĉar mi partoprenis en la 91a UK, Florenco, en 2006. Tie mi konatiĝis kun multe da lokaj vidindaĵoj, kies nomoj ofte aperis en la romano kaj rememorigis al mi tiamajn spertojn kaj okazaĵojn. Sankta Maria del Fiore, Sankta Kroĉe, rivero Arno, Placo de la Senjoreco ...

Paolo enamiĝis al Giraga, kiu sklave laboris en la familio Padzo. Eble tia klaseco ne estis malofta en tiu epoko. Dume lia patrino havis inklinon al ĝia rivala familiano Juliano de Mediĉo. Tiu komenca epizodo facile sugestis al ni abundon da aventuraj okazaĵoj deposte aperontaj. Kaj fakte ili aperis abunde. Sekve de la serioza batalo inter la du rivalaj familioj, Paolo kaj Giraga estis dispartigitaj en du malsamajn urbojn. Sed la finala epizodo de la ekvojaĝo de Paolo sugestas al ni ilian feliĉan revidon.

La libro estas dividita en 29 mallongajn ĉapitrojn. Tial oni povas facile legi, paŭzi kaj rekomenci. Tia konsisto pli intimigas ĝin al ni. Tiu ĉi libro devis eldoniĝi en 2006, sed la fakto estas en 2008. Bedaŭrinde.

Kia persono estis Leonardo da Vinĉi?

— leginte ; “Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi” de Hans Ulrich

jun. 2011, Tanigawa Hiroshi

La libro “Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi” vekis min al denova intereso pri la demando: *Kia persono aktuale estis la tiel giganta artisto Leonardo da Vinĉi?*

Leonardo restigis mirige multnombrajn, diversspecajn desegnaĵojn, inter kiuj estis ĉirkaŭ 200 dissekaj desegnaĵoj.

Rilate tion Siono Nanami, konata novelistino, studentino de itala historio, skribis;

Kun demando “kial?” Leonardo da Vinĉi ĉiam denove kaj denove observis, kaj enpensiĝis. Ripetante desegnadojn li ĉiam pli profundigis sian konon kaj penson. La antikva Greka Civilizacio estis eksplodo de ‘la kono’. La dua mondoskala eksplodo de ‘la kono’ komenciĝis en Firenze, tratabante la unuajn paŝojn de la Renesanco. (“Kio estis Renesanco?”, 2009, Sinto-Bunko)

Katagiri Kacumoto, fakulo pri la historio de italaj renesancaj belartoj, skribis;

La bildo ‘Mona Lisa’ estis unika kreitaĵo de Leonardo laŭ lia anatomia elstudo de la homa vidpovo. La metodo de stompado donis al la konturo de ‘Mona Lisa’ ekstreme delikatan elegantecon. (“Mito nomata Leonardo da Vinĉi”, 2004, Kadokawa-Sensho)

(Mona Lisa en la angla, japana, La Gioconde

en la itala, La Joconde en la franca. En Italujo oni ne nomas la bildon *Mona Lisa*, ĉar ĝi signifas en la slango en Toskana Regiono nomon de la virina seksorgano, skribis la sama aŭtoro.)

Resume, mi pensis.

Jenaj epizodoj priskribitaj en la libro “Paolo...” simbole klarigas; *kia persono aktuale estis Leonardo da Vinĉi. Kiel li povis esti unuaranga renesanculo.*

* *Knabo Mateo, kolego de Paolo, lernanto de Leonardo, diris al Leonardo; “Ni hejme manĝas birdojn”. Aŭdinte tion, Leonardo ege koleriĝis kaj diris. “Homoj kiuj manĝas birdojn ne scias kion signifas esti libera. Stultaj Florencanoj kaptas ilin por meti ilin en kaĝeton aŭ ankoraŭ pli terure, ili formaĝas ilin” Leonardo diris al Paolo; “Memoru, knabo, ke estas nenio pli grava ol via libereco. Dio donacis al ni birdojn por kompreni ĝuste tion.” (p.56, 57)*

* *Paolo mortteruriĝis kiam li observis la dissekcadon de kadavro faritan de Leonardo. Ĉu li estas herezulo? Oni akuzus lin al mortpuno! Leonardo diris al Paolo; ‘Herezulo?’ Multaj homoj kredas ĉion kion diras pastroj. Kiam vi pensas alimaniere, oni nomas vin herezulo. Mem pensu pri la aferoj, Paolo, ne kredu tion kion vi ne kredas. (p.104)*



ESE@

Avĉjo kaj avnjo(2/2)

2011-05-14

KOYAMA Takesi

2.Avnjo

luvespere en lifto de stacidomo grizhara sinjorino renkontis kun knabineto, kiu estas kune kun sia juna patrino. La knabineto diris al ŝi kun ĉarma rideto sur la vizaĝo.

“Avnjo, avnjo.”

Sed ŝi respondis nenion al la knabineto kvankam ŝi ekrigardis la knabineton. Elirante el la lifto, la knabineto denove diris turnante la vizaĝon al ŝi.

“Avnjo, avnjo...”

Sed ŝi afekte foriris grandpaŝe.

Poste ŝia edzo demandis ŝin.

“Kial vi ne respondis al voko de la knabineto? Vi estas malafabla.”

Ŝi malbonhumore plendis al li.

“La knabineto ne estas mia nepino. Mi ankoraŭ ne havas eĉ unu nepon. Tial mi ne estas ies ajn avnjo nek maljunulino kun kurbiĝinta dorso, sed virino nura.”

Sed laŭ knabineto ĉiuj pliaĝulinoj, kiuj estas pli maljuna ol ŝia juna patrino, estas avnjoj. La afektaĵo de maljunulino antaŭ knabineto kun la juna patrino estas iom ne taŭga, ĉu?

Tetrinkejo ĉe montokolo (Parto 1)



verkis Ogaŭa Mimei
esperantigis AIDA Kiyoshi

Troviĝis unu tetrinkejo en la mezo de iu montokolo. Ĉiuj, kiuj iras al la vilaĝo de la urbeto trans la montokolo kaj inverse, ripozas en la tetrinkejo.

Loĝis sola iu maljunulo tie. Li varme akceptis gastojn balainte la lokon. Li regalis ripozantojn per teo kaj kuko kaj donis varmigitan sakeon kun modesta manĝaĵo al ĉiuj, kiuj volas trinki. Li komercis sola longe post la morto de sia edzino kaj amikiĝis kun ĉiuj, kiuj ripozis tie. La maljunulo favore regalis gastojn kun rideto. Li estis alvokita de ĉiuj "Avĉjo", "Avĉjo". Kiam li estis okupita, li ne havis tempon pripensi kaj movis sian malgrandan korpon aktive. Sed kiam neniu venis, li faris nenion sidante antaŭ la ejo kaj dormetis. Sed pro aĝo li ĉiam sidadis sola kvazaŭ li sonĝus kun siaj okuloj malfermitaj aŭ ne. Li sentis sin kvazaŭ ebria pro sakeo.

Lastatempe daŭris tiaj tagoj por la avĉjo. Ekstere estis serena la aero de aŭtuna tago kaj bone aŭdiĝis la sono de trajno kuranta laŭ fora montopiedo. Kaj atingis la orelojn de la avĉjo la pepado de birdoj el arbaro kvazaŭ proksime.

Li streĉis orelojn ĝis la brueto de trajno fariĝis febla. Post kiam la trajno turniĝis al marbordo trans la monto kun unu fajfego, la bruo de la trajno malfortiĝis iom post iom.

"Baldaŭ videblos tra la fenestro de la trajno la ondiĝanta fora maro." La avĉjo sentis sin kvazaŭ li estus en la trajno. Kaj li rememoris, ke li kolektis multajn ĝuste kreskantajn fungojn en sia juneco, kiam li iris al monto por kolekti brullignojn kun sia filo. La nostalgia aromo de ekputrantaj folioj sur malvarma tero atingis lin antaŭ nazpinto eĉ nun. Kiam li revenis hejmen kun fungoj, lia edzino, kiu vivis tiam, tuj preparis manĝaĵon el ili.

Nun la pepado de birdoj sopire rememorigis al li la tiaman aferon. Kiam la avĉjo dronis en sia amuza fantazio sonĝe, tiam vilaĝanoj,

kiuj iris al la urbeto trapasinte la montokolon, revenis hejmen fininte siajn aferojn.

La milda kaj trankvila atmosfero similis al tiu de la monto, kiun la avĉjo vidas. La monto kaj ravino estis bele kolorigitaj je flavo, purpuro kaj ruĝo. Kaj li dronis en pensoj sub la penetre lazura ĉielo. Li bone sciis, ke la serioza uragano, kiu venigas vintron post la tagoj de favora vetero, atakos la lokon. Sed li forgesis pasadon de mallongaj sunradioj, ĉar li estis ravita de glora rememoro pri la pasintaj tagoj de printempo ĝis somero. Nenio rompis la kvietecon de la monto kaj la avĉjo.

(daŭrigota)



Pri la aŭtoro Ogaŭa Mimei

Ogaŭa Mimei (7.aprilo.1882~11.majo.1961) estis novelisto kaj infanliteratura verkisto, naskiĝinta en la urbo Takada (nuna Joecu) en la gubernio Niigata. Li diplomiĝis el Universitato Waseda (Ŭaseda). Li gajnis la postenon kiel noveliston pro la novelo "Hajlo kaj neĝpluvo" en 1904. En la jaro 1926 li decidis verki nur fabelojn, kaj fariĝis la unua prezidanto de Japana Infanliteraturo-Asocio en 1946. Li ankaŭ akiris la Kulturmeritan Premion en 1951. La ĉefaj fabeloj estas "Ora ringo", "Ruĝa kandelo kaj marvirineto" kaj "Sovaĝa rozo".

